Flandra ★ ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschijnt maandelijks
Dertiende jaargang
NUMMER 2 (140)
FEBRUARI 1946

Vertegenwoordiger in Nederland :
NEDERLANDA ESPERANTO-CENTRO
Diergaardesingel 96, Rotterdam-C
Girorekening : 272818 van N. E. C.

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO V.z.W.
Redactie en Administratie :
Pieter van Humbeekstraat 3, Brussel-West
Postrekening : 326851 van F. E. I.

5 fr.; 's jaars	60 fr.	5 fr.; jarabono	60 fr.
Steunabonnement	100 fr.	Subtena abono	100 fr.
Voor Nederland	4 fl.	Por Nederlando	4 fl.
Overige landen	75 fr.	Ceteraj landoj	75 fr.

For la Diletantismon !

En nia redakcia leterkesto ni trovas regule kaj, ho ve!, ankaŭ abunde novajn t. n. Esperanto-gazetojn kiuj plejofte estas nur malbone redaktitaj, apenaŭ legeblaj ciklostilitaj fuŝeldonaĵoj kun kompreneble plejeble bombastaj titoloj kaj subtitoloj. Ilia nura efiko estas finrezulte diskreditigi la seriozecon de nia afero, ankaŭ en la okuloj de eksterstarantoj, al Esperanto varbotaj personoj, kiuj, flarintaj la diletantismon kiu regas en esperantistaj medioj, por ĉiam sin forturnas de Esperanto.

La ironia diro, ke « ĉiu tria esperantisto deziras fondi organizaĵon kaj eldoni gazeton » bedaŭrinde enhavas tro da vero! Pli ol iam ajn la devo de ĉiu serioza samideano kiu konscias la gravecon de nia afero estas enviciĝi en kaj kunlabori al la ekzistantaj organizaĵoj kaj gazetoj kiuj inde kaj konsciencplene laboras por Esperanto. Ja ne la kvanto, sed la valoro gravas!

Ni ne povas rezisti la tenton ĉi tie represi la avertan artikolon de G. J. D. kiu aperis tiukoncerne en la februara numero de « Laborista Esperantisto ». Niaj legantoj bone primeditu la averton kiun ĝi enhavas kaj agu konsekvence por ke malaperu la plej granda plago pri kiu suferas la esperantistaro : la diletantismo !

LA GAZETFONDA FEBRO

Jam de sia estiĝo la Esperanto-movado ampleksis grandparte iom strangajn homojn, kiuj havas interesiĝon, krom pri Esperanto, ankaŭ pri ia ajn alia afero. Tio rezultas kredeble el la fakto, ke en pluraj tendencaj movadoj oni eksentis la grandan signifon, kiun Esperanto povas havi por la disvastigado de iaj ideoj. Sed natura sekvo el tio estas, ke pro siaj diversaj, ofte inter si kontraŭaj tendencoj la esperantistoj malfacile povas veni al por ĉiuj kontentiga organiza sistemo, kaj ke internaj kvereloj ne estas maloftaj fenomenoj. Pluraj unuopuloj kaj etaj grupoj sentas ian deziron al memstareco kaj malfacile kutimiĝas al por ĉiuj validaj organizaj reguloj.

Tiun ĉi fakton mi opinias la ĉefa kaŭzo de stranga fenomeno, kiu de l' estiĝo de Esperanto malbone influis ĝian disvastiĝon. Mi celas la inklinon de multaj esperantistoj, ĵus lernintaj la lingvon, traduki ian verketon, nur ili mem plaĉantan, kaj eldoni ĝin, verki kaj publikigi tordafrazajn flikaspektajn poemojn, kaj precipe : redakti kaj eldoni ian gazeton.

Kaj ĝuste al tio lasta mi deziras dediĉi kelke da vortoj.

Se propagandacele ni disdirus, ke en Esperanto aperas eble jam cento da gazetoj, ni certe imponus la publikon. Sed se ni aldonus al tio, ke la plimulto da tiuj gazetoj estas nur ciklostile presitaj kvaraŭ eĉ dupaĝaj folietoj, ke multaj nur vegetas pro nesufiĉe da abonantoj, ke en la tuta historio de nia lingvo oni facile povas kalkuli centon da gazetoj, kiuj apenaŭ atingis la vivodaŭron de unu jarkolekto, ke de multaj aperis nur unu numero, kaj precipe, ke la grandan plimulton plenigis nur la skribaĉado de mallertaj, senspertaj redaktemuloj, kiuj apenaŭ sciis la precipajn regulojn de la gramatiko, la imponiĝo de l' publiko unubate ŝanĝiĝus en malŝaton kaj mokemon.

Jam multe kontraŭbatalis tiun ĉi bedaŭrindan fenomenon pluraj seriozaj esperantistoj, precipe redaktoroj de gazetoj fidindaj kaj estraranoj de gravaj organizoj. Kaj tamen, malgraŭ tiu kontraŭagado de tag' al tago denove sin levas tia etredaktoro kun propralingvaĉa gazeteto, vane klopodante varbi kontentige sufiĉe da abonantoj per la preteksto, ke lia gazeto plenumas jam longe sentitan bezonon, sed kaptante en sian reton nur naivulojn, bonkredemulojn kaj homojn, kiuj opinias, ke ĉio, kio portas Esperantajn literojn aŭ verdan koloron, meritas ilian subtenon. Ĉiu tia agado nepre malsukcesas, kion plene pruvas la historio. Sed malgraŭ tio ĉiu renove aperanta gazeteto sensignifa alportas al ni novan malutilon : ĝi seniluziigas bonkredemulojn, senutile foruzas ilian monon, kaj precipe... ĝi detenas nepre bezonatajn fortojn kaj monon for de la organizoj kaj gazetoj, kiuj efektive meritas nian daŭran subtenon.

Decas denove averti kontraŭ tia agado. Jam renove aperis sur nia lingvotereno homoj, kiuj nepre deziras redaktori, foruzi aliies monon k.t.p. Ni atentu tion kaj zorgu, ne nur, ke oni mem ne kaptiĝu en iliajn retojn, sed ankaŭ kaj precipe, ke la esperantista publiko nepre konvinkiĝu pri la malutiloj, kiujn alportas ilia agado. Kiu disponas pri mono elspezota, tiu subtenu la seriozajn gazetojn kaj la gravajn organizojn!

Wat hebt gij zelf reeds gedaan?

Gaat gij akkoord met wat we schrijven in ons blad? Stemt ge in met wat we nastreven en voorstaan? Ja, en... wat hebt GIJ er dan reeds voor gedaan?

Hebt ge over ons blad reeds gesproken met anders- of niet-georganiseerde Esperantisten? Met sympathisanten? Hebt ge uw blad reeds ter lezing doorgegeven aan dergelijke personen?

Wijst ge uwe cursisten op onze organisatie? Spreekt ge hun over « Flandra Esperantisto »? Toont ge hun ons tijdschrift? Verspreid ge losse nummers onder uwe leerlingen?

Wilt ge ons blad uitgebreider, mooier nog, meer en beter geïllustreerd? Hoeveel abonné's hebt ge daarvoor reeds aangeworven? Zijt ge tot een klein offer bereid? Hebt ge uzelf als steunabonné aangemeld? Een abonnement aan uw buitenlandsche(n) correspondent(e) geschonken?

Kent ge personen die voor onze zaak kunnen gewonnen worden? Organisaties die voor onze ideeën vatbaar zijn? Stuur ons dan hun juist adres! We zullen ze drie opeenvolgende nummers laten geworden en ze dan door een persoonlijk schrijven trachten te winnen!

Gij hebt toch ook opinies naar voren te brengen? Gedachten te verdedigen? Suggesties te doen betreffend Esperanto en de Vlaamsche Esperanto-beweging? Grijp naar de pen! Stuur ons een goed doordacht artikel!

Wilt ge dat « Flandra Esperantisto » de trouwe spiegel zij der Esperanto-beweging in Vlaanderen? Brengt ons dan regelmatig op de hoogte van wat er omgaat en van wat er gedaan wordt in uwe plaatselijke vereeniging!

Gij verwacht — en terecht! — dat wij ons inspannen opdat de Vlaamsche Esperantisten over een waardig orgaan zouden beschikken? Daarom, wees niet passief, zie niet toe, maar

WERK DAADWERKELIJK MEE !

LETERO EL ĈEĤOSLOVAKIO

ESPERANTO-INSTRUISTO KARLO ŜOLC SKRIBAS :



Mlada Boleslav, dum Kristnasko 1945.

Tuj kiam la poŝtrilatoj denove ligiĝis kun Ĉeĥoslovakio la estraro de **Flandra Ligo Esperantista** aerpoŝte skribis al Karlo Ŝolc, unu el la konstantaj rektmetodaj instruistoj de nia landa Ligo, kiu dum pluraj jaroj antaŭ la milito en dekoj da lokoj instruis la internacian lingvon al multcentoj da flandroj.

Liaj sindono kaj idealismo estis rimarkindaj kaj li lasis impreson plejbonan inter la homoj kiujn li ne nur instruis lingve sed ankaŭ edukis en spirito zamenhofa.

Al lia multnombra lernantaro certe interesos la respondo de la tre simpatia profesoro kiu evidente ne forgesis ilin.

Furiozis fulmoj super nia Tatra,
kaj jen, malgraŭ ĉio,
vivas Slovakio, nia lando patra!

Al Flandra Ligo Esperantista,

Ĉe skribotablo via porĉiama, bonekonata amiko kaj via iama Esperanto-instruisto Karlo Ŝolc, kiu feliĉe travivis ĉiujn teruraĵojn militajn kaj kiu depost la militfino jam lernis al pli ol 200 novuloj nian karan lingvon, salutas kortuŝe al vi, flandraj geamikoj!

Neniam vi imagos al vi mian animstaton kiam la leterportisto transdonis al mi la leteron de via estraro! Apenaŭ la poŝto refunkciis kun eksterlando kaj jen, jam atingis min novaĵoj el Flandrujo! Skribi al vi estis mia intenco, sed antaŭ ol mi povis ĝin efektivigi mi staris kun letero de vi enmane... Koran dankon pro tio!

Permesu tamen ke malgraŭ via peto mi ne parolu pri la teruraj jaroj pasintaj. Ilin ni forgesu plej eble baldaŭ por plenfide kaj ĝojkore nin dediĉi senprokraste al nia bela afero kiun la homaro bezonegas.

Kun multaj el vi mi daŭrigis korespondadi ĝis tute rompiĝis la internaciaj rilatoj. La plejmulto el vi firme kredis je la nepra finvenko de Esperanto malgraŭ alproksimiĝintaj minaco kaj danĝero. Kelkaj komencis dubi, opiniante ke nia afero pereos okaze de la sanga teruraĵo kiu tiam grandpaŝe kaj senteble alproksimiĝis. Ilin konvinki pri la fakto ke Esperanto vivos malgraŭ antaŭvidebla persekutado plej insida mi daŭre klopodis. Eĉ kiam Esperanto malpermesiĝis ni daŭrigis nian korespondadon en germana lingvo...

Kaj nun, kiam post multaj jaroj ni denove spiras libere, mi retrovas vin, amikojn miajn, pli obstinaj, pli entuziasmaj, pli kuraĝaj, pli agemaj al antaŭe. Kaj malgraŭ tempo kaj distanco kiu disigas nin, vi ne forgesis Karlon Ŝolc! Tiaj konstatoj forgesigas multan suferon kaj doloron!

De mia brusto oni forprenis la verdan stelon kiun mi malkaŝe portis, sed la stelo kiun mi portas en mia koro estis nerabebla! La prezidanto de nia loka klubo pagis sian sindonon al Esperanto per sia multpromesa vivo. Li estas unu el la multnombraj viktimoj inter nia brava anaro dissemita sur tutmondo...

Kio sendube interesas al vi estas ekscii ke via iama Esperanto-instruisto iĝis feliĉa edzo kaj patro de dujara knabo kiu komencas balbuti esperante.

Mi aspiras renodi kontakton kun multaj flandraj amikoj kies malnovaj adresoj verŝajne ne plu validas. Danke mi ricevus skribaĵon de ili kaj plezure mi respondus.

En Ĉeĥoslovakio nun estas granda intereso por Esperanto kaj baldaŭ reaperos nia landa Esperanto-gazetaro. Ĉu vi aŭskultas niajn radio-elsendojn?

Aktoroj de nacia teatro en Praha diligente lernas Esperanton kaj baldaŭ restariĝos « Verda Stacio » kiu antaŭmilite regalis la esperantistaron per altnivelaj teatraĵoj, kantoj kaj muziko. « Verda Stacio » plejverŝajne nun havos sidejon en Praha anstataŭ en Brno.

Mi nun gvidas tri novajn kursojn por cento da personoj kaj planas tutan serion por skoltoj. Tiurilate mi serĉas gesamideanojn kiuj bonvolas kunhelpi per alsendo de originalaj aŭ tradukitaj rakontoj pri maristoj, fiŝkaptistoj kaj la vivo surmare ĝenerale. Mi utiligus tiun materialon por efike propagandi inter riverskoltoj. Ĉu iuj inter vi bonvolas kunhelpi?

Ĉu Flandra Ligo Esperantista bonvolas akcepti min inter sia anaro kaj ĉu regule mi povas ricevi vian ŝatatan Flandra-n Esperantisto-n? Kotizaĵon mi sendos tuj kiam la internaciaj rilatoj tion permesos.

Ke la nova jaro alportu al ambaŭ niaj multsuferintaj landoj la bonfarton kiun ni sopiras kaj ke en ili floru kaj kresku kaj plej baldaŭ finvenku nia Esperanto!

via sincera,
Karlo Ŝolc.
Ŝtate ekzamenita instruisto de Esperanto,
Mlada Boleslav 41/1.
Ĉeĥoslovakio.

OBSERVOJ

VEKIĜO.

Kia ironio! Per lozungo « Deutschland erwache! » oni sukcesis mistifiki grandan popolon multmeritan. Popolo grandmerita ankaŭ sur kampo esperanta! Ĉar kio estus vi, Esperanto nia, sen pioniraj Einstein, Trompeter, Meier kaj Schmidt? Sen Hankel, Mijbs, Steche, Arnold, Schramm, Dietterle? Ĉu vi ne estis 8,000-ope kaj bone organizitaj jam en 1914? Kiom Esperanto ja ŝuldas al Hirt, Ellersiek kaj Borel? Kiom al Tarnow, Jung kaj Wüster? Nur informita esperantisto povas laŭvalore taksi la cititajn nomojn. Senliman dankon ni ŝuldas al vi kaj multaj necititaj samnacianoj viaj — kaj ne laste al via karakteriza « ĝisfundeco »!

Venis nigra 1933. Jaro fatala por la homaro, por ĉiuj humanecaj klopodoj, por Esperanto — kaj por vi pleje tragika. Sed ni sciis tute fidinde, ke Esperanto ne mortis en Germanujo. Ke multaj tie sopiris la tagon kiam nia stelo denove povos brili. Kaj ne vane! Malgraŭ foresto de poŝtrilatoj ni ekscias ke en Hamburg Bünneman jam eklevis la stelan standardon kaj ke en Stuttgart Christaller jam svingas la verdan flagon! Jes, vekiĝu Germanujo, sed al noblaj celoj!

Kaj tiukoncerne ni memoras la vortojn de brita esperantisto, kiu antaŭnelonge esprimas sian konvinkon ke Esperanto denove ekfloros inter la germanoj, kaj ke estas la devo de ĉiu samideano helpi al ili kiom eble

Vere, ne mortis la spirita zamenhofa.

PIK.

ESPERANTO IN DE « VRIJE RADIO-TRIBUNE ».

We kennen allemaal de « Vrije Radio-Tribune » van het Nationaal Instituut voor Radiophonie die onder leiding van Marcel Coole om de veertien dagen voor zender Brussel de meest actueele onderwerpen behandelt.

Op Vrijdag 15 Maart a. s. te 21 u. komt volgend thema aan de beurt : « Wat denkt U over de noodzakelijkheid van een Wereldtaal? » Hoeft het gezegd dat dit iets is naar onze gading en dat wij, Esperantisten, zoo talrijk mogelijk onze zienswijze zullen inzenden?

HOE ZENDEN WE IN?

De behandeling van het onderwerp is volkomen vrij. Men lette er echter op dat het hier gaat over de **noodzakelijkheid** van een wereldtaal, noodzakelijkheid waarvan wij allen overtuigd zijn, maar die mag verdedigd of betwist worden.

Inzendingen moeten op de redactie van de « Vrije Radio-Tribune » van het N. I. R. (Eug. Flageyplein, Elsene-Brussel) **voor 1 Maart e. k. toekomen.** Er dient dus onmiddellijk naar de pen gegrepen!

Voor wie het niet weten wordt hier verduidelijkt dat de inzenders van de vier beste betoogen voor de microfoon hun tekst mogen komen lezen (maximum 3 minuten spreektijd). Hun reis naar Brussel wordt vergoed (2e klas) en er wordt aan elk 200 fr. honorarium betaald. Uit de andere inzendingen worden passages gelicht door den leider van de « Vrije Radio-Tribune ».

TALRIJK DEELNEMEN !

Het is van heel groot belang dat **zooveel mogelijk** inzenders voor de noodzakelijkheid van een wereldtaal in het algemeen en voor het aanvaarden van het Esperanto in het bizonder pleiten.

Het N. I. R. is een burcht die door de Vlaamsche Esperantisten moet worden veroverd. En men bedenke dat het hier in feite een steekproef geldt over de belangstelling die in Vlaanderen voor Esperanto heerscht. Daarom : talrijk deelnemen!

ESPERANTO IN ENGELAND.

Een wedstrijd werd uitgeschreven onder de Engelsche hoogstudenten waarvoor drie prijzen van 25 pond ieder zijn voorzien. Van de deelnemers wordt een dissertatie in het Esperanto en een vertaling uit het Engelsch in de internationale taal gevergd. Het initiatief voor dezen wedstrijd werd door de universiteit van Liverpool genomen.

Por nia Medito :

MAKSIM GORKI PRI ESPERANTO

La granda revolucia verkisto, Maksim Gorki, estis grande amiko de Esperanto. Pro lia progresemo, veremo kaj artoplena verkado li estas treege amata inter la bulgara laboristaro kaj speciale inter la bulgara esperantistaro. La Esperanto-societoj en Sofia kaj Svilengrad portas lian nomon.

Li havis plurajn favorajn eldirojn pri nia lingvo. En unu el siaj leteroj li i. a. diras :

« La argumento kontraŭ Esperanto estas, ke ĝi estas artefarita lingvo, kaj lingvojn oni arte ne kreas. Mi ne scias kiel estis kreitaj la lingvoj tiam, kiam la homo la unuan fojon sentis la bezonon paroli : la teorioj pri la deveno de la parolo ŝajnas al mi nesufiĉe klarigantaj tiun ĉi proceson. Sed al mi ŝajnas, ke ni homoj rajtas diri : ĉio, kion ni nomas « Kulturo », estas kreita de nia scienco, tekniko, arto, parolo — tio nome, kio nin apartigas de la bestoj — ĉio ĉi estas artefarita. La teokulereto estas objekto artefarita, tiel kiel artefaritaj estas la tranĉilo, la botoj, la veturilo, la boato, la aŭto, la vaporŝipo, la libro, la muziko, la bildo.

Por la homo — kiel ankaŭ por la besto — estas nature iri nude, muĝi kiel besto; sed estas tute nenature elpensi Prometeon, Faŭston, Donkihoton.

Ni loĝas en domoj, urboj, inter objektoj faritaj per la forto de nia racio kaj imago, per la forto de nia volo, por ke nia vivo estu pli facila kaj agrabla. Ĉio sur la tero estas kreata per streĉo de nia volo, nia racio kaj nia imagokapablo ».

El « **Internacia Kulturo** » (Sofia).
Numero de oktobro 1945.

VERDA KRONIKO

★ Depost la militfino aperis en la esperanta gazetaro informoj pli malpli sensaciaj pri la supozita morto, aŭ mortigo, de Lidia Zamenhof kaj de aliaj anoj de la Zamenhofa familio. Certeco nur estas pri la sorto de D.ro Adam Zamenhof, filo de D.ro L. L. Zamenhof, kiu mortis en germana malliberejo. Doktorino Wanda Zamenhof, bofilino de la Majstro, ripete asertis ke ŝi firme kredas ke Lidia kaj Zofia ambaŭ vivas.

★ Ni ricevis sciigon ke la bonekonataj kaj multlegataj Esperanto-aŭtoroj K. Kalocsay kaj J. Baghy ambaŭ vivas en Budapest.

★ Reaperis, plaĉe eldonita, « Espero Katolika », la monata organo de « Internacia Katolika Unio Esperantista ». Red. kaj adm. ĉe L. G. C. De Jong, Roelofarendsveen, Nederlando.

★ Responde al multaj demandoj S.ano T. Jung petas nin komuniki ke jam de ok monatoj li estas klopodanta pri reeldono de « Heroldo de Esperanto », kiu estis antaŭ la milito la semajna organo de la Esperanto-movado. Fine li sukcesis aranĝi ke la unua postmilita numero povos aperi post nelonge kun 8 grandformatoj paĝoj. La interesatoj petu detalan prospekton ĉe F. E. I.

★ Reaperis « Esperanto », la internacia revuo eldonata de « Universala Esperanto-Asocio ». La ĵus aperinta numero estas la 493-a. Redakcio kaj administracio : Palais Wilson, Genève, Svislando.

★ Aperis la oficiala organo de la Internacia Asocio de Postmark-Kolektantoj : « The International Bulletin — La Internacia Bulteno ». Bone eldonita 16-paĝa revuo en angla kaj esperanta lingvoj. Centra Oficejo : XPDO House, Didcot, Berks, Anglujo.

ESPERANTO IN DE RADIO

REGELMATIGE UITZENDINGEN :

Dagen	Uren	Golflengten		Stationsnamen		Programma
Maandag	22.20-22.30	1571	269.5	—	Praag I	Berichten
	23.00-23.15	1571	—	49.92	Praag I	Berichten
	23.00-23.15	—	—	49.06	Warschau	Berichten
Dinsdag	22.20-22.30	—	325.4	—	Moravska	Berichten
	23.00-23.15	1571	—	49.92	Praag I	Berichten
Woensdag	18.00	—	352	—	Sofia	Lezing
	23.00-23.15	1571	—	49.92	Praag I	Berichten
Donderdag	22.20-22.30	1571	269.5	—	Praag I	Berichten
	23.00-23.15	1571	—	49.92	Praag I	Berichten
Vrijdag	23.00-23.15	1571	—	49.92	Praag I	Berichten
Zaterdag	23.00-23.15	1571	—	49.92	Praag I	Berichten

N. B. — Deze lijst is verre van volledig : alleen de groote en doorgaans goed hoorbare zenders zijn erin opgenomen !

LA STUDANTO

DE PHONETIEK (VIII)

DE KLINKERS : OPEN-GESLOTEN UITSPRAAK

Ter gelegenheid van de behandeling der klinkers werden de accentuatie en de lang-korte uitspraak reeds scherp van elkander afgescheiden : bij de eerste geldt het **stemverheffing, toonhoogte,** bij de tweede louter **duur,** alhoewel de klemtoon hier een zekeren rol kan spelen. Men treft de lang-korte uitspraak ook in 't Nederlandsch aan, waar gene o.a. door de verdubbeling van den klinker wordt aangegeven, zoo : lang (kaas, beek), kort (kas, bek).

Thans wordt een derde, even onloochenbare, nuanceering aangestipt en men zal haar niet verwarren met de vorige : het gaat niet meer om stemverheffing of duur, maar om de **kleur** aan een bepaalden klinker in de uitspraak gegeven om zijn **open-gesloten** karakter. Dit verschil wordt aangeduid door de teekens : é (gesloten e), è (open e), ó (gesloten o), ò open o).

Maanden terug, bij den aanvang van onze uiteenzetting, hebben wij de wenschelijkheid, ja zelfs de noodzakelijkheid van de veralgemeening éénér uitspraak onderstreept : men denke b.v. aan tooneelstukken en voordrachten die aan een internationaal publiek aangeboden worden! Het is dus wel van belang de normaliseering van de diverse « nationale » uitspraken der « internationale » taal door te voeren. Op dat stuk toont een kort onderzoek aan hoe in feite geweldig uiteenloopende, zelfs tegenstrijdige, vormen worden aangewend : de hieronderstaande gegevens, zooals overigens het meeste in dit hoofdstuk, worden ontleend aan de reeds gemelde « Plena Gramatiko de Esperanto » van K. Kalocsay en G. Waringhien, die, naar ons weten, de eenige is waar het vraagstuk volledig en systematisch werd aangevat.

De Slaven brengen gewoonlijk een korte en open **e** uit in beklemtoonde lettergrepen (pèti, vènis, dèvas), doch in dezelfde omstandigheden wordt **a** lang : (ka:ra, ba:ri). De Duitschers spreken **e** open en kort uit in : dèvas, póvas, doch lang en gesloten in Lé:vi, kó:ro. De Finnen zijn de eenige die een lange **i** gebruiken in mia, via, kiu enz. De Hongaren houden van een lange en gesloten o-uitgang (hó:mó, amantó:) en zij spreken de korte **a** bijna als een open **o** uit, de lange open **è:** als een te gesloten **e,** bijna **i.** Op sommige plaatsen wordt, hoofdzakelijk vóór een klinker of r, een lange open **è:** gehoord in plaats van **é:** (vè:re, perè :o). Voor de Franschen zijn, wegens verkeerd onderricht in de leerboeken, alle **e** en **o** open. De Engelschen laten een korte **i** hooren achter de lange **é:** (pé:jtis) en een **ŭ** achter de lange **ó** (sinjó:ŭro). Het loont dus wel de moeite in die verscheidenheid wat eenheid, wat gelijkvormigheid te brengen!

Hoe zal men er aan verhelpen, welke theorieën en voorstellen zagen het licht, welke zuivering zal men aanraden, hoe zal men haar juist onder woorden brengen?

a, i, u.

In de meeste talen bestaat er geen onderscheid tusschen een open of gesloten uitspraak dezer klinkers. Vermits derhalve een verschil door de meesten niet wordt gemerkt of aangevoeld, zal men het verwaarloozen en gewagen : bij de klinkers **a, i, u** is er slechts spraak van een langkorte uitspraak, doch van geen nuanceering open-gesloten.

e, o.

Bij deze klinkers hoort men wel de open en gesloten vormen, die haast verschillende klanken beteekenen : de open **e** wijkt in feite zooveel af van de gesloten **e** als laatstgenoemde van de klank **i,** de open **o** zooveel van de gesloten **o** als laatstgenoemde van den klank **a.** Over deze vormen werd dan wel gediscussieerd en verdienen de opvattingen van **Zamenhof** zelf, **Ĉefeĉ** en **Wüster** gewis vermeld te worden.

Dit gebeurt in een volgende bijdrage.

T. v. G.

OEFENING 10

Hieronder, ter omzetting in 't Nederlandsch (A) en in 't Esperanto (B), kleine opgaven. In ons volgend nummer publiceeren wij een modelvertaling, met aanduiding van eventueele varianten en aanteekeningen, naargelang zij uit de inzendingen noodig blijken.

De oefeningen worden talrijk ingewacht langs de redactie om.

Let wel! Wie persoonlijk zijn werk verbeterd terugverlangt, verzuime niet een zegel voor antwoord bij te voegen.

A) **Malespero :**

La maljunulino subite komprenis la tutan teruron, la vivon, la kruelon, la ribelon, ĉion, ĉion, nur la finon ŝi ne povis kompreni, ŝi ne povis kompreni la morton, ŝi ne povis kompreni la homojn, la homojn, kiuj forlasis ŝin, kiuj ne zorgis ŝin. Kaj la katastrofa teruro donis al ŝi pli ol homan forton. Ŝi rektiĝis, aljetis sin kontraŭ la muron, frapegis ĝin, trovis du telerojn, jetis ilin al la fenestro, ke eĉ la rompita vitro ne restu tie. Vazojn ŝi jetis kaj rompis ĉion, kion ŝi povis. Ŝin okupis la ebria plezuro de la rompo kaj ribelo (F. Szilágyi, el la novelo « Vintro », p. 117).

B) **Zinnetjes :**

1. Suiker en honing zijn zoet, doch water is smakeloos.
2. Om zijn leven te redden, loog hij.
3. Haar vele kennis en ervaring zijn haar van veel nut geweest.
4. Zingend trokken de stakers naar hun vergaderplaats.
5. De berk is een boom en heeft takken en bladeren.
6. Ik voelde duidelijk dat dit niet waar was.
7. Niettegenstaande hij reeds dronken was, dronk hij nog een glas leeg.

VERTALING VAN OEFENING 9

A) **Uit J. Baghy.**

De eerste liefde kan men zoo niet in den grond stoppen. Zij komt terug uit het graf om te spoken. Voor gevoeligen is haar magnetische kracht onoverwinlijk. Bij menschen, zooals Paŭlo en Anika (zijn), rijpt het wederzijdsch begrijpen na vergissingen en smarten. Laat ons ons eerder erbarmen dan een streng oordeel vellen over dezen die slechts gescheiden elkaars waarde kunnen erkennen. Zij zal wachten en hij terugkomen. Misschien zal hij terugkomen met een gewond hart, gebroken ambitie, doch gewis komt hij terug... (« Verdaj Donkihotoj », p. 174).

B) **La ruza vilaĝano.**

Vilaĝano volis aĉeti novan ĉapelon. Li iris al la urbo kaj vidis en butiko Panama-ĉapelon, kiun li deziris aĉeti. Li demandis pri la prezo. « Kvardek kvin guldenoj », la vendisto respondis.

La vilaĝano ruze rediris : « Kie estas la du truoj? » « Nova ĉapelo ne havas truojn », la vendisto respondis. Sed la vilaĝano diris : « Tiu ĉi ĉapelo nepre devas havi du truojn, por ke la azeno, kiu pagas kvardek kvin guldenojn por ĝi, povu meti siajn orelojn tra ili. » (C. J. en J. C. D.).

LA REDAKCIO RESPONDAS

Pri la decembra ekzerco, no 8.

La maloftaj ensendoj kaj la korekteco de eĉ ne unu traduko montris la malfacilecon precipe de la esperantigo (vere ĝi estis komplika!); sed neniu perdu la kuraĝon : la du pli facilaj ekzercoj de marto rajtigos al premioj... Mi esperas ke tiam ĉiuj streĉos siajn fortojn kaj pruvos sian kapablon!

« La Ruza Vilaĝano » estis ĝenerale perfekta, sed la fragmento el « Alles komt terecht » de M. Roelants stumbligis ja ĉiujn. Ĉiuj ensendintoj senkonteste erare tradukis : ...« die vragen rijzen doet **zooals**... »; oni uzis la adverban formon(kiel) kiam evidente la adjektivaj korelativoj « **(tiajn)kiaj** » necesis, do : « kiuj starigas demandojn(tiajn) kiaj... »

La plimulto krome forgesis la predikativon post la verbo **nomi** (ekz. mi nomas lin azeno (kaj ne azenon) kaj tial ankaŭ : « ...kion oni nomas la belo (ne : **belon**) ».

En la frazeto : « hij denkt **nog** aan wat... » **nog** signifas « buitendien, daarenboven, verder » (Cfr. Modern Woordenboek de Prof. Dr. J. Verschueren, 3); do, « **krome** » estas pli laŭsenca ol « **ankoraŭ** ». Same, **innerlijke** bewogenheid : **emocio** estas ja ĉiam interna kiel **bewogenheid** mem; la signifo de « **innerlijk** » ŝajnas do « **warm, echt, wezenlijk** (eod. loco, 2) kaj Esperante : **malfalsa, vera** ktp. Kvankam en « ...een goed verslag zou **anders**... », **alie** ne estas nekorekta, miaopinie la senco trudas la signifon : **gewoonlijk** (eod. loco, 3); mi do preferis : **kutime.**

Ni do konstatas ke, de pli nuancaj tekstoj, ankaŭ la preciza flandra senco ludas rolon; precize tiun ĝustan sencan signifon mi aludis postulante « **nauwkeurig omgezette woordenschat** » kaj tute ne laŭvortan, laŭliteran tradukon, kion kelkaj Studantoj ŝajnas malprave kredi. Ni ankaŭ notu ke nur unu teksto estas akceptebla : do ne ensendu du aŭ tri diferencajn proponojn!

A. kaj M. W., Breedene-aan-Zee, Verda, A. L. Antwerpen : viaj taskoj estis resenditaj kun personaj notoj.

— « Efektive, Doktoro, mi legis vian peton profite al aŭstra militkaptito, sed mi ŝatus ekscii pli da detaloj koncerne lian heroajon. Ĉu li jam delonge estas en la hospitalo? »

Kaj la altranga oficiro prezentas al la alparolita hirurgo longan, dikan cigaron en riĉe ornamita kesteto. Siavice li prenas ekzempleron, ekbruligas ĝin kaj atendas, aŭskultpreta.

— « La historio estas nur mallonga, sinjor' Kolonelo. Iun nokton, en septembro 1943, ambulanco alkondukis malamikan aviadiston. — Ne eksterordinara okazaĵo, kiel ni ja scias!... — Sed la soldato, — poste evidentiĝis ke li estas oficiro — tiel malbonstatis, ke ni konsideris lin mortonta. Mi nur supraĵe citas : rompitaj kruro kaj brako, domaĝitaj ripoj, grandnombraj vundoj kaj kontuzoj, preskaŭ sensanga korpo. Tio klarigas lian longan restadon en la hospitalo. Sed, lia fortika organismo venkis kaj nun li eĉ bonfartas. »

« Antaŭ tri monatoj, dum la timiga brulego kiu parte detruis la hospitalon kaj pri kio oni certe raportis al vi, li vere kondutis ne kiel aŭstro, sed kiel amiko. Malgraŭ sia relativa malforteco, li nepre volis ke ni akceptu lian helpon ĉe la savo de multvaloraj aparatoj. Kiel frenezulo, li kuris enen kaj eksteren. La fajrobrigado jam alvenis, la maŝinoj jam funkcius, kiam flegistino alkuris :

— « Malsanega servisto ankoraŭ troviĝas sur la supra etaĝo! »

« Kelkaj estingistoj disvolvis solidan velon, dum aliaj sin pretigis por eniri la konstruaĵon. Sed la aŭstro protestis :

— « Ne, mi iros, mi volas savi lin, mi savos lin! » kaj li malaperis.

« Sekvis angoraj minutoj, vi komprenas. Fine, fenestro malfermiĝis kaj, post esplora rigardo malsupren, la malamika pacienco, ĉirkaŭata de fumo, singarde faligis la malsanulon. Post momento, li mem saltis de sur la fenestrobreto sur la velon — alia maniero ne plu eblis —. Mi konstatis ke li eksvenis. Verdire, sinjor' Kolonelo, mi ankoraŭ ne komprenas lian forton kaj kuraĝon por plenumi tian heroajon... Kiam li rekonsciiĝis, li tuj demandis : « Ĉu li vivas? » kaj post konfirmo : « Mi estas feliĉa. Mi provis iom kompensi la bonon kiun oni faris ĉi tie al mi. »

— « Noblaj paroloj, Doktoro, mi konsentas. Sed mi ne bone komprenas vian peton. »

— « Povas esti ke ĝi iom mirigas. Nu, kiam mi diris al la aŭstro ke li komplete resaniĝis, sekve, ke lia restado en la hospitalo finiĝis, li subite malĝojis kaj petis :

— « Lasu min ĉi tie, dejorigu min kiel ian ajn helpanton. »

« Surprizita, mi ne sciis kion respondi. Mi rememoris lian heroecon dum la brulego kaj decidis turni min al vi... »

Plenatente la kolonelo aŭskultis. Subite la stariĝas, kaj kun milda rideto, kiu lumigas lian severan vizaĝon :

— « Mi donos al li pli bonan rekompencon. Li estas aŭstro, vi diris, ĉu ne? Li iru hejmen. Sendu lin al mi, ni diru : postmorgaŭ. Intertempe mi pretigas la necesajn legitimaĵojn. »

Heinrich Kreutzer medite rigardas foton. Li ne konscias la ĉirkaŭaĵon : la bildo de ĉarma infaneto kun blondaj bukloj kaj petolaj okuloj kaptas tutan atenton lian... Plejverŝajne ĝi ne plu rekonos lin, forpasis ja tiom da tempo...

Hezita ektuŝo de dolĉa mano sur lia ŝultro ree surterigas lin.

— « Kiel profunde vi enpensiĝis! » ridetas mezaĝa flegistino. « Ĉu nova foto? »

— « Ne... », kaj abrupte : « Baldaŭ mi revidos mian filineton... »

« Anĝelo » — la malsanuloj tiel nomas la bonkoran, kompreneman flegistinon — « Anĝelo » esplore observadas lin :

— « Nu, ĉu ne eksterordinaraj bonŝanco kaj favoro? »

Li silentas, ne levas la okulojn.

Intimatone ŝi demandas :

« Ĉu tio ne pleje feliĉigas vin? »

Li nur silentas kaj ŝovas de sub la infana foto, belan, malfreŝdatan bildon de gracia virino. La simileco de ambaŭ vizaĝoj estas okulfrapa.

— « Mi divenas vian penson », ŝi kompatas.

Sed ŝi vigliĝas, metas sian blankan manon sur la vilan lian :

— « Heinrich, rigardu min. Ĉu vi memoras ke foje, post suferiga, melankolia tago, vi estis senafekte konfidenca al mi?... Do, mi scias ke nigraj pensoj ofte turmentas vin; mi scias ke vi ne ĉiam senriproĉe kondutis al via edzineto, kun... aliaj virinoj... Nu, forpelu tiujn malhelajn pensojn, forgesu la makulitajn paĝojn de via vivolibro. Mi precipe scias, ĉar sperte, ke vi multe ŝanĝiĝis, en la bona direkto, ke... »

— « Dank' al vi, Anĝelo, dank' al vi », li interrompas ŝin. Kaj ignorante ŝian protestan geston, li pludiras :

— « Vi instruis al mi ke oni estu bona por ĉiuj, ankaŭ por la bonvola malamiko. Dankon! Tion mi neniam forgesos ».

— « Nu, estu bona por... ŝi..., kio ajn okazis », ŝi substrekas siajn lastajn vortojn kaj funde esploras lian rigardon, kvazaŭ ŝi volus legi en lia animo.

Li deturnas la kapon sed ŝi ne rezignas sian taskon :

« Ĉu vi jam vidis la filmon : « La Dometo inter la Dunoj? »

Kion ŝi celas, li demandas sin, kaj responde :

— Povas esti... Jes, jes, en Parizo. »

RENOVIĜO

ORIGINALE VERKIS : VERDA. — PREMIITA EN LA LITERATURA KONKURSO DE FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO

— « Ĉu vi ankoraŭ memoras la finon? »

— « Ho ne! Mi nur supraĵe sekvis la disvolvon de la rakonto. »

— « Nu, jen la fina frazo : « Estas neniam tro malfrue por rekomenci belan vivon »... Pripensu tion, Heinrich, kaj bonŝancon! »

Grete Kreutzer-Rogler triafoje ripetas al si la tekston de la telegramo, kiun ŝi tenas en sia tremanta mano :

« Morgaŭ, marde, 18-a horo, estos kun vi. Plejkore, Heinrich. »

Ŝi ne plu vidas la vortojn, ne plu povas legi ilin : abundaj larmoj nebuligas ŝian rigardon. Strange : li revenas kaj ŝi ploregas. Ĉu pro bedaŭro aŭ sopiro? Ĉu pro feliĉo aŭ honto? Eble pro nenio, eble pro ĉio, ŝi mem ne scias.

Kaj ŝi memoras ke antaŭ kelkaj monatoj, preciza la 5-an de majo, ŝi same plorĝemis en kvieta vespero printempa, sed... pro tutalia kialo : li foriris, li... « la alia », kiun ŝia kvinjara Ilonja kutimis nomi : « paĉjo... » Finita la ŝajna, la imagita feliĉo! Kiel ŝi povis tiel stulte kredi al ĝi?

Certe, la vivo ne estis roza por soleca eksvienanino, en ĉi tiu izolita vilaĝeto. Certe, ŝia edzo sendis al ŝi nur maloftajn, lakonajn vivosignojn en la unuaj militjaroj, kaj poste nenion plu : nu ja, aviadistoj havas danĝerplenan metion. Sed, malgraŭ la necerteco rilate la edzan sorton, neatentante siajn edzinecon kaj patrinecon, ŝi ne povis deteni ŝin de la plena vivoĝuo, kaj... ŝia nomo aldoniĝis sur la listo de la malfidelaj... Ho, ŝi ne hontis tiutempe, ĉar ne pripensis, nur profitis.

Kaj, subite la bildo de tiu, kiun Ilonja nomis « paĉjo » klare aperas antaŭ ŝia spirito : altstatura militkaptito malamika... Li ŝatis infanojn, surstrate kelkfoje donis ĉokoladon al ili, ankaŭ al Ilonja. Li estis afabla junulo, sensperta, kaj plaĉis al ŝi. Per bongustaj kukoj kaj tro ĉarmaj paroloj ŝi allogis lin; per provokaj rigardoj kaj invitaj gestoj ŝi tiris lin en sian reton... Li estis mildanima kun ŝi kaj patre dorlotis ŝian Ilonjan. Por ŝi li kaŝe forlasis la barakon, vespere. Pro ŝi li pasigis kelkajn tagojn en malliberejo, kaj poste revenis. Ĉi ĉio supozigis al ŝi lian fundan amon. Pri estonteco ŝi ne volis pensi, nur la hodiaŭon ŝi deziris ĝui kaj profiti.

Proksimiĝis la anglaj militistoj... La unuaj soldatoj penetris en la vilaĝeton kaj li alkuris :

— « Jen la liberigo! Hejmen! Hejmen! » Ĉu li do ne konsciis sian kruelecon? Ŝi konsterniĝis, preskaŭ eksvenis. Spite ŝiajn petegojn kaj singultojn, li foriris :

— « Estu racia, Grete. Vi havas beletan infanon, via edzo revenos, mi reiras al mia patrino ».

Kia elreviĝo! Pli ol unu jaron ŝi kredis sin ĉiele feliĉa. Kiel naive blinda ŝi estis malgraŭ sia mezaĝo!

Iom post iom ŝia animstato ekvilibriĝis. Nun ŝi plene komprenas ke ŝi estis nur ludilo por li, kaj tio pro propra ekscito... Pri tiuj ŝajne belaj tagoj restas nur amara postgusto, malsato, malkontento...

Ŝi movas manon : la telegramo bruetas... Ŝi vekiĝas... Do, li revenas, li, ŝia leĝa edzo, la vera paĉjo de ŝia Ilonja. Subite ŝi ektimas. Ŝi memoras ke li ja estis foje kaj foje bruta al ŝi, li insultis, li batis ŝin. Kial do? Ĉu nur pro krudeco? Nun la pli matura virino humile konfesas al si ke ankaŭ ŝi kulpis. Ofte ŝi ne atentis liajn dezirojn, egoisme volis satigi nur la siajn : forresti plurajn tagojn en Vieno por festi, danci, amuziĝi. Jes, ŝi neglektis lin kaj li koleriĝis. Fatale. Kiel ĉio estas simple klara, evidenta nun!

Ŝia rigardo renkontas la lastan vorton de la neatendita sciigo : « Plejkore ». Strange. Ĉu li plimoliĝis? aŭ ĉu ŝi ne konis lin kia li estas? Kial li ne plu skribis lastatempe? « Plejkore », ŝi enpense ripetas. Kaj unuafoje ŝi kaŝas sian vizaĝon pro honto.

Ilonja ludas sola antaŭ la domo. Ĉarma infano! Morgaŭ ŝi unuafoje iros lernejon. Estos certe pli gajige ol ĉi tie, nun kiam paĉjo forestas kaj en ĉi tiu kvartalo ne loĝas aliaj ludkamaradetoj : « Ĉu ŝi povos kunporti sian pupon, sian... »

— « Ilonja, venu ĉi tien! » aŭdiĝas la patrina voĉo.

Kiel eble plej longe ŝi prokrastis la komunikon de la novaĵo al sia filineto. Tre malvolonte ŝi faros tion, sed nepre necesas prepari la infanon al la renkontiĝo. Imagu, ke...

— « Nu, panjo? » ŝi demande levas la okulojn.

— « Aŭskultu, Ilonja, mi havas tre gravan novaĵon : post du horoj ni estos triope... »

— « Ĉu paĉjo? » ŝi interrompas kaj, pro la konfuzita mieno patrina :

— « Ĉu vere, panjo? Ho, mi... »

— « Ilonja, Ilonja, aŭskultu... » ŝi rediras.

Sed la ekscitita knabineto nenion plu aŭdas, kapriolas tra la ĉambro, saltetas jen sur la dekstra, jen sur la maldekstra piedo ĉirkaŭ la tablo, ĝojkriante :

— « Paĉjo revenas! Paĉjo revenas! Li ludos kun mi! Mi ne iros lernejon! Mi surmetos lian faldĉapon kun la amuza kvasteto! Li donos ĉokoladon el la amerikaj pakaĵoj! Kia ĝojo!... »

Grete staras kaj rigardas, senhelpa. Baldaŭ ŝi vidas ke ŝiaj vortoj neniel efikas sur la ludema etulo. Ŝi atendos la rekvietiĝon.

Ilonja reiras al siaj ludiloj antaŭ la domo. Soldato staras ĉe la sojlo : strange! Fingreton en la buŝo, ŝi alrigardas lin per grandaj mirokuloj, kiel nur infanoj tion povas. Momenton li restas senspira.

— « Ilonja... » li flustras.

Li kaŭriĝas, premas sian karulineton al sia larĝa brusto, kaŝas sian emocion en la silkajn bukloj n :

— Ĉu ci vere ne plu rekonas... cian paĉjon? »

La infano subite rektiĝas, atente ekzamenas liajn trajtojn, lian uniformon, precipe lian faldĉapon :

— « Ne, vi ne estas paĉjo, ne, ne! » ŝi ekploretas. Kaj kun ektimo en la voĉeto : « Panjo! Panjo! »

La alkuranta virino precize vidas kiel ŝia edzo delasas sian kriantan, baraktantan filineton, kiu fulmrapide sin ĵetas al ŝi :

« Ne estas paĉjo... Paĉjo estas... pli granda... kun bruna... uniformo... kaj gaja kvasteto... » ŝi singultas.

Grete surbrakigas la knabineton, serĉas konsolajn vortojn, timas kaj atendas manbaton. Sed li ne moviĝas, direktas al ŝi longan rigardon, samtempe riproĉan kaj suferplenan, kaj malrapide foriras...

Nekonscia, Heinrich instinkte suriras la krutan montvojeton, kiu serpentumas tra pinarbaro. La plej kontraŭaj pensoj interpusiĝas en lia kapo. Kia seniluziiĝo! Bonintenca li revenis por komenci novan vivon. Kaj jen... Ne, tion li ne sciis, ne povis supozi. Kial li do revenis? Ĉu nur por suferi, anime post korpe? Belega rekompenco! Kial li ankoraŭ deziras vivi? Ĉu ne pli bone...

Li haltas sur la pitoreska ponteto, apogas sin sur la ŝtona balustrado kaj avide rigardas. Animorava ĉirkaŭaĵo!... La krepusko sterniĝas sur la pejzaĝon kaj la arĝenta duonluno verŝas fabelan lumon sur la endormiĝantan naturon. Kaj li rememoras... Kiomfoje li venis ĉi tien!

Kiel knabo li ludis kun siaj kamaradetoj laŭlonge de la arbara rando, ĵetis ŝtonetojn en la ŝaŭmantan akvon, trapasis la rivereton saltante de ŝtono sur ŝtonon. Senzorga tempo!...

Kiel fianĉo, kiel junedzo li faris senfinajn promenadojn kun Grete, kun sia Gretchen... Ĉi tie, en same kvieta vespero, ŝi promesis fariĝi lia edzineto... Ebriigaj momentoj meze de surtera paradizo... Li rememoras ĉion, kvazaŭ li ĉion ree travivus... Karmemora tempo!...

Pala lunradio arĝentas la trankvilan lagon en la valo kaj karesas la maloftajn dometojn ĉirkaŭajn. Jen lia hejmo...iama. « Edeno » vidiĝas reliefe, super la pordo... Edeno! Ho ironio!... Nun ne plu decus kanti : « Saluton, ĉasta, pura domo... », por veki la Belan Dormantinon! Certe, tiu « surogata paĉjo » ne plu estas tie, « brunaj uniformoj kun gajaj kvastetoj » ja foriris, tamen... Sendube, ankaŭ ili venis ĉe tien, kune staris ĉi-loke, kune ĝuis... Malbenita tempo!...

Kaj li estas tutsola. Molaj infanmanetoj ne plu karesos liajn vangojn, dolĉa edzina kiso ne plu forviŝos liajn larmojn. Kia vivo! Ho, kiom alloga estas la plaŭdanta akvo sub li! Senhalte ĝi vojas plu, ĉiam antaŭen : simbolo de la vivo. Ĉu li komparu sian vivon kun ĉi tiu kristalklara montrivereto? La akvo renkontis teron, polvon, ŝtonojn, malpuraĵojn, eble putraĵojn, sed ĝi restas plej pura. Ĉu li? Antaŭ la aviada akcidento ankaŭ li renkontis tiajn aĵojn en suspektindaj ejoj : ĉarmajn fivirinojn... Kian vojon li poste iris plu?... Fi! La efemera feliĉo utopia foriĝis, restas nur malsato, malkontento, eĉ honto nun...

« Jetu la unuan ŝtonon, kiu estas senpeka ». Ne, li ne rajtas ĵeti ŝtonon al ŝi. Li same eraris, plej grave. Plie, li konsentas ke li kondutis kelkfoje tro krude al ŝi. Kial esti netolerema pro bagateloj? Kial obstine rifuzi ke ŝi foje kaj foje amuziĝu? Sekvis ekscesoj ambaŭflanke. Kompreneble. Fakte, ili nek konis, nek komprenis unu la alian, vivis unu apud la alia... Lastatempe li eĉ ne plu skribis al ŝi, kvazaŭforgesis ŝin; ŝi do povos supozi...

La akvo fariĝis malpli alloga... Ne, iliaj vivoj ne estas kompareblaj al ĉi tiu klara rivereto. Ĉu ies vivo? Ĉu ies?... Jes, tiu de Anĝelo, la sinrega, bonkora flegistino, al kiu ĉiuj plenfide konfidencis. Image li revidas ŝin : « ...estu bona por... ŝi, ...kio ajn okazis... » Ĉu ŝi do sciis? Ĉu ŝi konjektis? Komprenema, noblanima « Anĝelo »! Ĉu li jam forgesis ŝian instruon? Ĉu li estus malbrava?... Ilonja! Gretchen!... Ĉu vere estas neniam tro malfrue por rekomenci belan vivon?...

En blanka negliĝo, Grete sidas apud la liteto de Ilonja. Ŝi aŭskultas la regulan spiradon de la finfine endormiĝinta infano.

Kion ŝi travivis ĉi-posttagmeze, ĉi-vespere?... Ŝia kapo terure doloras. Ŝi ne plu kapablas pensi. Kie estus Heinrich? Jam noktiĝas! Aŭtomate ŝi subeniras, malfermas la dompordon, rigardas la lokon kie staris ŝia edzo.

— « Gretchen! » — li etendas manon. Lia ĉeesto ne mirigas ŝin.

— Ĉu vi ne komprenis kion Ilonja malkaŝis? » ŝi lace demandas.

— « Ankaŭ mi ŝatus ion rakonti », li kondukas ŝin al la benko sub la fenestro.

Nur la diskreta nokto ĉeestas duoblan konfeson, ambaŭflankan konstaton pri malkontento, reciprokan pardonon...

Vuala akvofaleto kviete susuras en la silento, kaj mistere briletas en la arĝenta lunlumo.

Li fingre montras ĝin :

— « Nia nova vivo estu kristalhela kiel ĝi; nia nova feliĉo serena kiel la nuna nokto, ĉu ne...? »

Timeme, ŝi kliniĝas al li :

— « Nur vin mi amos. »

— « Edzineto mia... »

WERELDGESCHIEDENIS ORIGINEEL IN ESPERANTO



H. Haefker : JARMILOJ PASAS

Mondhistorio originale verkita en Esperanto

500 grandformataj paĝoj kun artaj reproduktaĵoj kaj geografiaj skizoj. Eble la plej impona verko kiu aperis en la lingvo internacia! Ĝi estas evidenta pruvo, ke eĉ plej malfacila, spirita tasko perfekte povas esti majstrata per Esperanto. Mondhistorio de profesia, ŝtate premiita verkisto. « Jarmiloj Pasas » estas objektiva verko, riĉega je ideoj, fonto neelĉerpebla por la pliriĉiĝo de l'scio. En pli ol cent ĉapitroj preterpasas nian spiritan okulon la potenca Romano de l'Homaro.

Broŝurita : Fr. 85.— ĉe FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO.

NI PREZENTAS...

La modernan **Esperato revuon**

★ *belilustrita*
★ *interesa*
★ *12 paĝa*

Noveloj - artikoloj - poezioj

La plej bela, la plej interesa!
Petu specimenan numeron sendante unu internacian respondkuponon al
MONDA REVUO ILUSTRITA
Box 30, **Randers**, DANMARK.

LOSSE NUMMERS VAN F. E.

zijn te koop :

te Antwerpen : « **Esperanto-Domo** », Lange Leemstraat 127.

te Brussel : « **Esperantista Librejo** », hoek Bodenbroek- en Regentiestraat.

te Brugge : Boekhandel « **Unicum** », Vlamingstraat 7.

te Mechelen : Boekhandel « **Moortgat** », Veemarkt 4.

te Turnhout: Boekhandel « **De Pelikaan** », Otterstraat 68.

Plaatselijk Nieuws

ANTWERPEN. — Voor een bomvolle zaal sprak S.ano J. Swinne van E. K. I.-Brussel op 6 Februari jl. over « La Liberekonomia Movado ». Gezien de stijgende belangstelling die de maandelijksche Esperanto-voordrachten in het Esperanto-Huis der Lange Leemstraat 127 genieten, zal bij gelegenheid van de volgende causerie te houden door Dr. T. van Gindertaelen, op Woensdag 6 Maart e. k. om 20 u., voor meer zitgelegenheid worden gezorgd.

De plaatselijke afdeeling van den Vl. Esperantistenbond hield haar statutaire jaarvergadering op 29 Januari jl. Het bestuur voor 1946 werd als volgt samengesteld : voorzitter Dr. T. van Gindertaelen, tweede voorzitter A. Lodema, eerste en tweede secretaris onderscheidenlijk Mej. M. Dockx en J. Timmermans, kassier E. Boyens, feestbestuurder F. Volders, bibliothecaris J. van Geel. In zijn toespraak tot de leden onderlijnde de voorzitter dat « **Flandrema Grupo Esperantista** » zich onverpoosd zal inspannen om haar ledental op te drijven en het taalkundig peil van de aangeslotenen te verhoogen. De voorgenomen cursus vangt aan op 25 Februari en zal worden gegeven iederen Maandag van 20 tot 21.30 u. in het lokaal « Nieuwe Carnot » der Carnotstraat (eerste verdieping). Lesgeld : 60 fr. (voor leerboek en woordenboekje). Men kan nog inschrijven bij gelegenheid der tweede les, op Maandag 4 Maart.

BRUSSEL. — De Esperantisten uit de hoofdstad noodigen al de belangstellenden uit op hun **Lentefeest** dat plaats grijpt in de zaal der Rollebeekstraat 7, op Zaterdag 9 Maart e. k. te 19,45 u.

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

PREMIO : Akiris ses poentojn post la decembra enigmo : S-ro C. Callewaert (Brugge). Li ricevas kiel premion : « Hindo rigardas Svedlandon », de L. Sinha.

SOLVO DE LA 9a ENIGMO

HORIZONTALE : 1. putra; polur. — 2. aer; muze; ili. — 3. raŭka; petol. — 4. posteulo. — 5. arom; evit. — 6. enig. — 7. orfo. — 8. anas; nask. — 9. strateto. — 10. kopii; farti. — 11. opi; stri; ten. — 12. varik; krozi.

VERTIKALE : 1. parta; alkov. — 2. U.E.A.; ruin; opa. — 3. trupo; aspir. — 4. komposti. — 5. amas; risk. — 6. tref. 7. nokt. — 8. pepu; efik. — 9. eleganta. — 10. litov; aorto. — 11. ulo; iris; tez. — 12. rilat; klini.

10-a ENIGMO : KRUCVORTO

ATENTU la novan regularon en la januara numero!



HORIZONTALE: 1. prefikso; esti sperta pri io (R); parto de cirklo (R). — 2. havanta inklinon al io; korpoparto (R). — 3. parto de tempo (R); levmašino (R); sufikso (R). — 4. ĉiukonsente (R). — 5. komercaĵo; koloro (R). — 6. taŭga; pripensita procedaro por plej bone atingi difinitan celon (R). — 7. gliti en aero kun etenditaj, ne moviĝantaj flugiloj (R); mallarĝa terparto inter du maroj (R). — 8. loĝi dum nokto (R). — 9. avenuo (R); parto de korpo (R); arbo (R). — 10. grandega ŝtono (R); provizi per rimedoj por ataki aŭ defendi (R). — 11. meti iun en akvon por lavi (R); lerte trompa (R); dividebla per du (R).

VERTIKALE : 1. tio, kio estas entenata en io (R); stangeto el metalo kiu ordinare servas por plej firme fiksi objekton ĉe alia (R). — 2. iu ofta fluidaĵo (R). — 3. aparato servanta por fermi (R); senfina (R). — 4. kvanto (R). — 5. nutra grio ekstraktata el medolo de iuj palmarboj (R); gi estas uzata por fiksi ŝipon (R). — 6. povo, pravigita de leĝo, nepre fari ion aŭ postuli de iu alia (R); interjekcio. — 7. ŝirmita kontraŭ infekta malsano (R); favora cirkonstanco (R). — 8. konigi al iu tion, kion li bezonas scii (R). — 9. malbona stato de la sango (R); fari presan markon sur io per frapo (R). — 10. malgranda kvanto da fluaĵo (R). — 11. manĝilo (R); aparta ekzemplero de laŭleĝa metala pagilo (R).

La solvoj atingu la redakcion antaŭ la 10-an de marto.

SENDU AL MI adresojn de filatelistoj (E-istaj aŭ ne-) el via urbo kaj mi rekompencos al vi per E-libreto. S° J. C. J. Ham, Huygensstr. 17 B, ROTTERDAM-W., Nederlando.

ANONCETOJ

Minimum : fr. 15.—
Ieder woord of afkorting : fr. 0.75

SIAMO. 25-jara soldato en la Ned. Hinduja Armeo, eksmilitkaptito de la japanoj, dez. gekorespondantojn en Eŭropo por rakonti pri siaj travivaĵoj en Javo kaj Siamo. Skribu aerpoŝte al Adriaan Smits, Eur. Brig. 95504, NAKORN PATOM, SIAMO.

DEZIRAS KORESPONDI kun ĉiuj landoj pri ĉ.temoj :S.ano P. Champs, 128 Bd. Ch. de Gaulle, Pierrefitte-Seine, FRANCUJO. Certe respondas!

KUN FLANDRAJ GEESPERANTISTOJ dez. kor. : Ŝterjo Zaf. Kukuŝev, Mihail str. 114, Peŝtera, BULGARUJO. La samon deziras : Aleks. Petrunov, 17-jara lernanto, Str. « C. Boris » 60, Sofia, BULGARUJO.

S.ano R. G. RICHARDSON, BM/GRAN, London, W. C. 1, ANGLUJO (maturaĝa) dez. kor. kun knaboj.

FLANDRAJ GEESPERANTISTOJ deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Certe respondas! Skribu multnombre al : J. Deckkers, Gerarduslei 8, St. Mariaburg (Antwerpen), Belgujo.

MI PERDIS ĉiujn miajn E-ajojn pro militokazaĵoj kaj deziras ricevi gazetojn kaj informojn pri la E-movado : van Heek, Geerdinksweg 58, HENGELO-O, Nederlando.

DEZIRAS KORESPONDI : F-ino T. Janssen, Kerkstr. 20, **Hillegersberg**, ROTTERDAM-N., Nederlando.

JAĤTO VETURAS EL...

« KRIMINALA ROMANO »

Verkis : Deck Dorval.
Tradukis : Dro T. Ken.

« Ni do devas supozi ke la aŭtoro, post la pafo, ŝovis la butonon en la manon de Maxton. »

« Jes, alivorte temas pri bone primeditita misfaro. » Kant elpoŝigis paperon; lia vizaĝo estis severa. « Jen la listo de la pasaĝeroj, ĉiuj ŝajne honestaj homoj; tamen unu el ili estas la krimulo kiun ni serĉas! »

ĈAPITRO 9-a

La listo indikis :

Otto Maxton, industriisto, St. Louis (Usono), 66-jara.

Theodore van der Meersch, notario, Bruselo (Belgujo), 40-jara.

Herman Steinmann, industriisto, Krakovo (Polujo), 65-jara.

Sinjorino Steinmann, naskiĝinta Maria Scholz, Bostono (Usono), 57-jara.

Alex Steinmann, inĝeniero, Novjorko (Usono), 28-jara.

Grafo Hector G. C. de la Fosse, sen profesio, Lieĝo (Belgujo), 39-jara.

Grafino de la Fosse, naskiĝinta Madeleine Vervier, Namuro (Belgujo), 36-jara.

Jean Baptiste De Groot, kuracisto, Antverpeno (Belgujo), 62-jara.

Sinjorino De Groot, naskiĝinta Sophie Belders, Gento (Belgujo), 61-jara.

Jean Dubois, komponisto, Lyon (Francujo), 35-jara.

Xaverius Kant, ĉefinspektoro de la juĝa polico, Antverpeno (Belgujo), 40-jara.

Juan Gulopez, filologia doktoro, Madrido (Hispanujo), 30-jara.

Henry Higgs, servisto, Blackpool (Anglujo), 55-jara.

Fraŭlino Stella Sterlen, sen profesio, Parizo (Francujo), 24-jara.

Fraŭlino Yvonne Durlet, sekretariino, Bruĝo (Belgujo), 27-jara.

« Dekkvin homoj », murmuris Doktoro Gulopez, « kaj inter tiuj dekkvin... »

« Krome forfalas : Maxton, ni ambaŭ kaj ankaŭ Dubois kaj fraŭlino Sterlen kun sia nekontestebla alibio, do minus kvin, faras dek suspekteblajn kandidatojn. Relative malgranda nombro. Sinjorino De Groot, kiu malfacile povas sola movi sin, ankaŭ havos puran konsciencon. Do restas nur naŭ. »

Doktoro Gulopez meditadis ion ja dum plena minuto.

« Kaj Fraŭlino Durlet? »

« Fraŭlino Durlet estas pasaĝero kiel la aliaj. Kial ne ŝi? » Kant uzis ĉiujn siajn fortojn por ne montri ke li tiel respondis nur por vidi la reagon de la juna hispano.

Tiu ĉi ja kunŝovis la brovojn, sed ne opiniis kontraŭdiron oportuna.

« Ek », Kant diris, « ni startu kaj gajnu la venkon. Ni kune ankoraŭ serĉu la pafajon. Ĝis nun mi ankoraŭ ne malkovris ĝin kaj tamen ĝi devas esti en la ĉambro. Ni iru! Ha, jes, la ŝlosilfaskon mi kunprenas. »

Ekstere sinjoro Steinmann atendadis ilin.

« Sinjoro Kant », li agitite diris, « ĉu vera la onidiro? Ĉu sinjoro Maxton...! » La grandindustriisto estis en stato de ekstrema ekscito. Kant kapjesis.

« Terure!... Terure! Mia Dio, mia Dio, estas preskaŭ nekredeble. Ĉi-surŝipe, sub niaj okuloj! Kiel io tia povis okazi. » Li ŝajnis malespera.

« Tion la enketo malkovros, sinjoro Steinmann, pardonu, mi havas urĝan laboron. »

Serĉi kuglon en meblita ĉambro ege similas la proverban draŝadon de fojno.

Tamen, ĉi-fojon Kant pli bonŝancis. Li malkovris trueton en la skulptitaj spiralaĵoj de la peza kadro antaŭ la sefo. Ne senpene li eligis la kuglon. Ĝi estis nikelita, iomete tordita kaj kun kelkaj neprofundaj foldetoj kie la metalo estis skrapita en sia fatala iro.

« Multon tiu aĵo certe ne pruvas, sinjoro Kant? »

« Vi eraras. Balistikisto deduktus ja multon. Ni eĉ konstatus, helpe de kelkaj simplaj geometriaj nocioj, kie la pafo estis ellasita. Unue estas pruvate ke la viktimo estis turnita al la pentraĵo, ĉar ĝi estis trafita en la malantaŭo de la kapo. La loko de la ingo cetere konfirmas tiun fakton : kutime, ĝi dekstre flugas el aŭtomata pistolo. »

Gulopez iom pripensis.

« Momenton mi opiniis ke oni ellasis la pafon tra la luko, sed tio do maleblas? »

« Prave. Tion jam pruvis la situo de la kadavro, la preskaŭtuŝa ekpafo kaj la ingo en la ĉambro. Cetere, la ĉambro forte odoris pulvon kiam ni eniris. »

« Ĉu 9 mm-a kuglo? »

« Jes, la kalibro de preskaŭ ĉiuj armepistoloj. Kolosa armilo ! Pezas minimume unu kilogramon. »

« Vi ne tre esperas trovi la armilon? »

« Neniel. Nun la fiŝoj eble detale priflaras ĝin sur la fundo de la maro », Kant ridetis.

« Venu, Doktoro », li diris plu, iel provi malfermi la sefon kaj ankaŭ la valizon, kiu troviĝas en la banĉambro. Post tio la pridemandoj povas komenciĝi. »

La sefo ne estis apertebla. Kant ne vane penis plu. La kofro enhavis paron da blankaj kostumoj kiajn oni portas en la tropikoj. Tamen, sube kuŝis ligaĵo da leteroj afrankitaj per sudamerikaj poŝtmarkoj de antaŭ kvar jaroj. Ĉiuj direktitaj al Maxton mem. Aparta blanka koverto enhavis poŝtkartan foton de barba viro.

« Verŝajne memoraĵoj », Kant diris. « Ni tamen kunprenu tiujn ĉi leterojn. Venu. Ĉu pasante vi volas peti Higgs en mian kajuton? Ni tie kiel eble plej okazigos la pridemandojn. Tempoŝparo kaj malpli da ĝeno; vi bonvolu noti. Mi jam antaŭiras. »

Kant apenaŭ sidiĝis kiam Doktoro Gulopez kaj Higgs jam frapis.

Perfekte razita, kun vangharoj iometon tro longaj, la griziĝanta nigra hararo profite dividita en la mezo, Higgs enpaŝis klinante sin.

Lia tro alta amelita kolumo kun nigra kravato kaj la zorge brositaj samkoloraj vestoj perfidis la viron kiu li estas : sinjora servisto.

Kant memoris la jargonon de Higgs kiam tiu ĉi nederlande parolis; li tuj komencis angle :

« De kiam vi servas? »

« Je Ĉiuj Sanktuloj, sep jarojn, sir ». La tembro de Higgs tute harmoniis kun lia aspekto.

« Kiel Mr. Maxton dungis vin? »

« Pro persona rekomendo. »

« Kiaj estis la rilatoj inter vi kaj Mr. Maxton? »

« Bonaj, sir, mi kredas ke la ĝentlemano siamaniere kontentis pri mi. »

« Kaj vi? »

Kant tuj atendis la preskaŭ neperceptebla heziton.

« Mi ja ŝatis Mr. Maxton, sir. »

« Ĉu via mastro iam ne estis iom... iom malfacila? »

Ree malgranda hezito kaj io kia fajrero lumis en la subulaj okuloj.

« Ne ĉiam estis facile plaĉi al Mr. Maxton, sir. »

« Kion vi scias pri la dramo? »

« Tre malmulte, sir. » Higgs tute estris siajn nervojn kaj kviete respondis kiel se li anticipe pesadis siajn vortojn.

« Mi jam enlitiĝis, aŭdis kvazaŭ pafon, unue ne sciis kion fari kaj sekve eliris. La ceteron vi scias, sir. »

« Kiom da tempo pasis inter la pafo kaj via eliro? »

« Du, tri minutoj, eble kvar. Mi ne povas precize diri tion. »

Doktoro Gulopez diligente notis.

« Kial? »

« Kiel mi jam diris, mi unue ne bone sciis kion fari aŭ pensi, sir. Kiam oni... »

« Ĉu vi kutime enlitiĝis antaŭ ol via mastro? »

« Ne, sir, Mr. Maxton diris al mi ke li ankoraŭ devas fari ion kaj ne volas ĝenon. Li ne plu bezonis min. »

« Ĉu tio estis nekutima? »

« Ja okazis pli, sir. »

« Kiam vi lastafoje vidis Mr. Maxton? »

« Kiam li ĝuste revenis de la ŝakludo, sir. Li sonorigis por mi kaj diris kion mi jus deklaris al vi. »

« Ĉu li aspektis kutima? Ĉu li eble estis kvieta aŭ nervoza? »

« Li aspektis kutima, sir. Mi ja kredas ke li ree suferis. Vi scias ke li malsanis, sir. »

« Kiom da sonorigiloj troviĝas en la ejoj de Mr. Maxton? »

« Nur unu, sir. La prembutono troviĝas sur la skribotablo. »

« Ĉu vi scias kion Mr. Maxton ankoraŭ devis fari? »

« Ne, sir, sed mi kredas ke li ankoraŭ akceptis iun. »

« Kiel vi scias tion? »

« Mi aŭdis voĉojn, sir. »

« Ha! Kion oni diris? »

« Mi ne aŭskultis, sir. » Higgs estis videble ofendita.

« Ĉu vi povis aŭdi kiu estas la vizitanto? »

« Ne, sir, la kajutvandoj estas tre sonsorboj. La nura fakto ke mi aŭdis ion pruvas ke oni laŭte parolis. »

« Cu ne eblis al vi decidi ĉu viro aŭ virino ankoraŭ tiel malfrue vizitis Mr. Maxton? »

Higgs bone pripensis.

« Ne, sir. »

« Ĉu vi aŭdis tiujn voĉojn, ĝuste antaŭ la pafo? »

« Ne, sir, multe pli frue. »

« Kiam? »

« Mi... ne certas, mi ne tiel atentis tion, sir. »

« Ĉu vi sciis ke la vivo de Mr. Maxton estis minacita? »

La ĉambristo senutile frotis sian bone kombitan hararon.

« Ne, sed mi tamen pensis pri tio. »

Kant iom silentis kvazaŭ atendanta pluan eksplikon.

« Antaŭ paro da tagoj Mr. Maxton sonorigis al mi por malkorki botelon de viskio, poste mi krome devis prepari alian pakaĵon el la vestoŝrankо. Kiam mi pretis pri tio kaj revenis en la grandan kajuton, Mr. Maxton ĝuste montris brovningon... « Li iom hezitis. » ...al sir Dubois kaj ion diris pri... kiel protekti sin mem. »

« Protekti kontraŭ kiu? »

« Tion mi ne aŭdis. La konversacio estis interrompita ĝis mi eliris. »

« Ĉu vi scias ĉu via mastro havis, ĉi-surŝipe, malamikojn. »

« Ne, sir, ne. »

« Ĉu vi havas ŝlosilon de la ĉambro de Mr. Maxton? »

« Ne, sir. »

« Bone, Higgs. Finite... Hm! jes, ankoraŭ io. Kiam Mr. Maxton alivestis sin, ĉu malplenigis vi liajn poŝojn? »

« Kutime, sir. Kompreneble, kiam mi ĉeestis. »

« Kio estas tio ĉi? » Kant montris la grizan saketon sur la tablo.

« Mi ne scias, sir. Mr. Maxton ĝenerale kunportis ĝin. Neniam mi povis preni ĝin el lia jakopoŝo kiam li lasis ĝin. Tio cetere ekstreme malofte okazis. Mi opinias ke estas... rimedo kontraŭ malsano, sir. Speco de talismano. »

« Dankon, Higgs. Vi povas for. Mi ja vokos vin se mi plu bezonus vin. »

La servisto iris.

La okuloj de Doktoro Gulopez leviĝis de la notoj.

« Ne pruvita alibio, sinjoro Kant. »

Doktoro De Groot ĝuste frapis. Li finis la nekropsion.

Lia ekspliko estis precize objektiva kaj tre skrupula, kvankam iom tro malkonciza. La morton kaŭzis unuura pafo ellasita de tre proksime. La pafaĵo penetris de malantaŭe, maldekstre en la kranion, traplugis la cerbon kaj, tranĉinte tempian arterion, forlasis la kranion tra la dekstra okulo.

« Mi kiel eble plej rapide havigos la skribitan raporton, inspektoro. » Profesoro De Groot purigis siajn okulvitrojn kaj atendis.

« La morto do estis tuja? »

« Kompreneble, sinjoro Kant. Kiel mi diris... »

Dua disvolvo ne logis Kant. Tamen, por certi li iel alimaniere esprimis sian demandon.

« Do, post la pafo la viktimo ne povis fari eĉ ununuran paŝon? »

« Maleble! Vidu, sinjoro Kant, la detruo de la... »

« Jes. Pluaj luktospuroj forestas? »

« Tute. La korpo estas tute sendifekta. Nur la dekstra tibio montras etan gratvundon, tre verŝajne jam kelktagan. La hemoglobino en la ŝiritaj histoj... »

« Dankon, Profesoro. Sufiĉas. »

La kuracisto ŝajnis seniluziigita. Li pensis renkonti pli da intereso por sia scienca klarigo.

Post kian la Profesoro forlasis la kajuton, Doktoro Gulopez demandis, ordigante siajn paperojn :

« Kies vico nun, sinjoro Kant? »

« Hm! Ni venigu fraŭlinon Durlet. »

« Ĉu mi petos ŝin tien? » Doktoro Gulopez tute diligentis.

« Bone. Mi atendas. »

Li reve fiksrigardis la grizan saketon, sed liaj pensoj sekvis la ŝakmajstron.

(DAŬRIGOTA.)

Verantw. uitgever F.E.I. — Bestuurder : E. Cortvrlendt, P. van Humbeekstraat 3, Brussel. — Drukkerij A. Hessens, Komediantenstraat 12, Brussel.